

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Supre staras la kapelo  
Sur la pinto de la mont',  
La paštist' en suna helo  
Goje kantas ĉe la fonto.

Triste la sonorileto  
De funebro sonas de  
La altaj' tra la kvieto,  
La paštist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni  
La gajuloj post vivfin'.  
Ho, paštisto, iam oni  
Portos supren ankaŭ vin.

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto  
Goje kantas paštisteto.

Sonorado, mortkantando  
Nun eksonas tra l' silento, -  
Haltas knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paštisteto,  
Oni iam tien prenos.

Ludwig Uhland,

## Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,  
Schauet still ins Tal hinab.  
Drunten singt bei Wies' und Quelle  
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,  
Schauerlich der Leichenchor;  
Stille sind die frohen Liegender,  
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,  
Die sich freut en in dem Tal:  
Hirtenknabe, Hirtenknabe!  
Dir auch singt man dort einmal.

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Supre tronas sur la monto  
La kapelo en kviet'.  
En la valherbej' ĉe l' fonto  
Goje kantas paštknabet'.

Kun funebra sonorilo  
Ektimigas mortkan-tad'.  
Finas tuj la ĝojjubilo  
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto  
Supren en la tombojn venos  
Paštoknabo, laŭ la sorto,  
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANNFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).*

*Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11).*

*Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)*

*Vidu:[http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl\\_l03.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_l03.html).*

*Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas audebla tie: <http://www.musicenet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.*